

Nº 04
1965


G.L. GIMELLI


# ITALA fervojisto

**Organo Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti**









IFEA

# JUBILEA KONGRESO EN ORIENTA LANDO

La 50-a Universala Kongreso de Esperanto, la jubilea solena kongreso, kiu okazis ĉijare en Japanujo, TOKIO, de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto, apenaŭ decidita vekigis tiel grandan intereson kaj entuziasmon en ĉiuj mondaj esperantistoj ke ili multnombre alkuris en Tokio, por montri al malgranda japana popolo ke ne loĝas malproksime de la cetera homaro, ke ĝi ne estas izolita de la okcidentaj landoj; kaj por pruvi al la tuta mondo la efikon de Esperanto kiel internacia lingvo, kiel ilo de frateco kaj interkompreno.

La 1-an de aŭgusto, en la teatro "UENO BUNKA KAYKAN" okazis la solena inaŭguro, antaŭ impona scenejo, multkolora pro vestoj kaj rasoj; sed unu sola estis la lingvo: Esperanto; unu sola la sento: frateco, kiu ne postulis interpretistojn kaj policanojn por konservi la ordon. Mi opinias ke nur la Esperanto-Kongresoj pasas sen policanoj, ĉar ĉio disvolviĝas en la plej perfekta harmonio kaj serena mieno.

Presidis S-ro W.Holmes, Honora Presidanto de U.E.A. kaj prezidanto de la Kongreso. Sur la podio sidis pluraj japanaj eminentuloj, inter kiuj la Urbestro de Tokio, la ĝenerala Sekretario de la landa Unesko-komisiono, unu reprezentanto de la Ministerioj por edukado kaj eksterlandaj aferoj, kaj la prezidanto de Japana Akademio, D-ro Shibata, kiel alta protektanto de la kongreso. Plie la membroj de la Loka Komitato.

D-ro Nishi, prezidanto de L.K.K. salutis la ĉeestantojn kaj dankis, unu post la aliaj, ĉiujn lokokoanojn, iliajn kunlaborantojn, al kies laboro oni ŝuldas la imponan sukceson de tiu kongreso, unika en la mondo: unika kiel jubilea, kaj unika kiel la unua en Azio.

La Japana popolo montris la taŭgecon de Esperanto kaj nia miro kreskis vidante tiom da japana juneco; ni devas kuraĝigi la novajn esperantistojn nin miksiante inter ili kaj parolante ĉiam esperante. Nur Esperanto povas penetri la misteran orienton, ĉar nur per ĝi oni povas kompreni kaj kompreniĝi. Tiaj la kortuŝaj vortoj de la prezidanto de L.K.K.

En sia parolado D-ro Shibata salutis la kongresanojn je la nomo de la Japana Akademio; kaj tre interese menciis pri siaj lingvaj spertoj en internaciaj kongresoj. La parolon poste ricevis S-ro Inoua, ĝenerala sekretario de Unesko, kiu dankis U.E.A. kaj L.K.K. pro la feliĉa organizo de tiu granda kongreso. Li proponis proponi al Unesko (ĝenerala organizo pri kulturo) pritrakti la lingvan aferon kiel interkomprenigilo, kaj solvi la problemon favore al Esperanto, ĉar li vidis ke tiu kongreso ne postulis interpretiston. Se ĉiu internacia kunveno uzus nur unu lingvon estus gajno da tempo kaj monŝparo. Dankis je la nomo de U.E.A. la ĝenerala sekretario S-ro Becker.

Post mallonga paŭzo da 15 minutoj la 27 landaj esperantistaj organizaĵoj salutis kaj bondeziris sukceson al la kongreso.

Tre feliĉa, laŭ oratora vidpunkto, sekvis la festparolado de D-ro Carlo Minnaja, jam konata en nia Movado kiel venkinto de pluraj oratoraj konkursoj kaj kiel ĝenerala sekretario de T.E.J.O.

La kulturaj programoj, kies laboroj disvolviĝis dum la tuta kongressemajno: Fakaj kunvenoj, oratora kaj belarta konkursoj, prelegoj, estis multnombre kaj interese vizitataj; sed por la junularo kaj por ĉiuj ne mankis distroj kaj amuzaĵoj; kiel: japana kaj teatra vespero, vizitoj de la urbo, oficiala balo, la tuttaga ekskurso en la plej famaj orientaj belaĵoj, kaj la oficialaj akceptoj de la Urbestro kaj de pluraj ambasadoroj. En tipe japana ĝardeno "Kiyozumi Teien", en la orienta parto de la urbo, la Urbestro oficiale kaj riĉe akceptis, mardon, 285 kongresanojn el 40 landoj kaj la membrojn de L.K.K. Pluraj ambasadoj, inter kiuj la Germana, Pola, Sveda, Usona kaj Itala organizis, dum semajno, akceptojn por la koncernaj kongresanoj.

Sabate matene, en la sama teatro de la inaŭguro, la Prezidanto de la Kongreso S-ro Holmes, okazigis la solenan fermon de la kongreslaboroj; kaj ĉiu estrarano raportis pri la koncerna semajna aktiveco. Kopio de la "Dia Komedio" estis donacita al S-ro Casse el Francujo, kiel pioniro de Esperanto, kiel lasta ĉeestanto de la unua kongreso en Boulogne-sur-Mer, en 1905.

## 52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE LA ISRAELA ŜTATPREZIDANTO, S-RO ZALMAN ŜAZAR.
TEL AVIV (Israelo): 2-9 de aŭgusto 1967.-

Esperanta poŝtmarko: Dank' al klopodoj de la Centra Komitato de Esperanto - Ligo Israela, L.K.K. kaj apartaj israelaj esperantistoj, la Ministerio de la Poŝto decidis eldoni specialan poŝtmarkon okaze de la 52-a U.K. en Tel Aviv.

Estas farotaj pluraj klopodoj pri eventuala eldono de ankoraŭ almenaŭ unu Esperanta poŝtmarko en Israelo.

Ekskursoj: La Loka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso du tuttagajn ekskursojn: al Jeruzalemo kaj al Nazareto. La ekskursoj okazos samtempe dimanĉon la 6-an de aŭgusto.

Loĝado: Por loĝado dum la U.K. estos la ebleco elekti inter pluraj kategorioj de hoteloj, kies prezo varias de ĉ.8 gld.(komuna loĝejo) ĝis 60 gld.

Aliĝado: Ĝis la 12-a de decembro aliĝis entute 433 personoj el 32 landoj.

Itala Karavano: Itala Esperanto-Federacio (Via Po, 7 Torino) intencas organizi flugkaravanon al U.K. en Tel Aviv. La vojaĝo startus de Milano (aŭ Torino) kaj Romo la 30-an de julio kaj daŭrus ĉ.20 tagoj. Ĝi inkluzivus dutagan restadon en Istambulo, tritagan viziton en Libano, sestagan ekskurson tra Egiptujo, dutagan restadon en Ateno kaj tutsemajnan partoprenon en la Kongr.

Lastmomente: Okaze de la U.K. en Israelo kelkaj s-anoj intencas profiti la okazon por viziti ankaŭ la Sanktajn Lokojn en Jordanio. Tiuj, kiuj deziras ĝui la eksterordinaran ŝancon, skribu tuj al: Rev.Pastro A.CICCANTI, Convento S.Bernardino - RIMINI (Italio).

N I  L E G I S  E N:

-"ARTS CHEMINOTS" n-ro 65, revuo de la Arta kaj Intelekta Unuiĝo de Francaj Fervojistoj, longan franclingvan artikolon kun foto, pri la 18-a Internacia Kongreso de Fervojistoj-Esperantistoj en Utrecht (Nederlando), verkitan de nia amikino J.Lhermitte.

-"La VIE DU RAIL" n-ro 1063, tutpaĝan franclingvan artikolon kun 4 fotoj pri la vizito al Francio de la folklora grupo "Branko Cvetkovic" de la Jugoslavaj fervojistoj gvidataj de nia amiko Dragutin Buha, prezidanto de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj.

-"RAIL ET PROGRÊS" organo de "La Protection Mutuelle" de la fervojistoj en Francio, franclingvan artikolon pri Esperanto kun foto de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof.

-"Stelle dell'Orsa" kultura revuo, itallingvan dupaĝan artikolon kun 4 fotoj pri "Esperanto-Lingvo de la Mondo", verkita de jurnalisto Tino Pozzi.

-"850" - "124" kaj "TERO MARO ĈIELO", tri belegajn plurpaĝajn katalogojn pri automobiloj kaj aliaj produktaĵoj de F.I.A.T. Ili estas prezentataj sur riĉa papero kun multegaj koloraj fotoj kaj Esperantlingva teksto.

-"LA ESPERANTISTA KULTURDOMO-Kastelo GRESILLON" 49-BAUGE' (Francujo), esperantlingvan kvarpaĝan faldfolion pri plano de la kulturaj aranĝoj dum la jaro 1967.

N I-G R A T U L A S: la familion de nia amiko Kurt GREUTERT pro la naskiĝo de tria infano, filineto MANUELA, kaj koregе bondeziras.

D E Z I R A S  K O R E S P O N D I: Nove fondita Fervojista Esperanto-Rondo serĉas korespondadon: Fervojista Esperanto-Grupo D.D.R. 727 DELITZSCH R.A.W. (Orient-Germanio).

### E S P E R A N T O  E N  L A  R A D I O

RADIO ROMA - DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1967-a. La dissendoj okazas de h. 17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.). Ondlongoj m.30,90=Mc/s 9,71 kaj m.41,24=Mc/s 7,27. Redaktoro: L.Minnaja. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al ĉi-subaj temoj:

FEBRUARO 1967-a: 2086 dimanĉon la 5-an: La itala poeto Guido Gozzano; 2087 dimanĉon la 12-an: Italaj Regionoj: Emilio; 2088 dimanĉon la 19-an: La fama kantisto Enrico Caruso; 2089 la 26-an: Italaj turismaj urboj: Novara.

MARTO 1967-a: 2090 la 5-an. Tra la literaturo; 2091 la 12-an:Novaĵoj el Italujo; 2092 la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto; 2093 la 26-an:Leterkesto.

I. F. E. A.

RAPORTO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO DUM LA JARO 1966-a

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA (ITALUJO)

SEKRETARIEJO: Via Donato Creti, n-ro 61 = Bologna (Italujo. Telefonnumero 35.90.71. C.C.Postale (Poŝtkonto) n-ro 8/24094.

- ĜENERALA SUPERRIGARDO:

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." estas kultura asocio kaj konservas sin tute for de politikaj, religiaj kaj sociaj ideologioj.

La I.F.E.A. aliĝis al F.E.I. (Federazione Esperantista Italiana-Morala Organizaĵo pro Dekreto de la Prezidanto de la Respubliko de la 28-a de junio 1956-a) kaj U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio-en konsultaj rilatoj kun UNESCO) kiel aliĝinta membro, kaj al I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperanto Federacio) kiel landa rondo.-

- Agado de la MEMBROJ:

Nia Sekretario p.i.Germano Gimelli estas Vic-Delegito de U.E.A. en Bologna. Nia Vic-Prezidanto D-ro Inĝ.Giordano AZZI (eks estrarano kaj komitatano de U.E.A.) estas delegito de U.E.A. en Como, kaj Ĝenerala Direktoro de grava fervoja entrepreno. Niaj anoj Komm.Adv. G.S.Boscarino, Komm. Ramolfo, D-ro Falcoz, S-roj Rossino, Sommi kaj Gaddoni, estas respektive Delegitoj de U.E.A. en Ragusa, Torino, Aosta, La Spezia, Fidenza (Parma) kaj Casalecchio di Reno (Bologna). Niaj membroj Formaggio, Prof-ino Dazzini, Gimelli, Quarone, De Salvo, Daglio kaj Perini estas Fak-Delegitoj de U.E.A. respektive en Torino, Massa, Bologna, Milano, Roma, Alessandria kaj Trento.

Nia elstara Honora Membro Lia Moŝto Adv. Raffaele Bagnulo estas Honora Prezidanto de la Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini".

Dum la jaro 1966-a IFEA ricevis alian fortan baton: post la morto de nia tre amata Prezidanto Kav.Zacconi kaj de elstara veterano D-ro Inĝ.O Nanni, la 16-an de septembro 1966-a forpasis nia ŝatata membro D-ro Inĝ.Giuseppe Albonetti kiu estis konsilanto de nia Asocio.

- AGADOJ KAJ MANIFESTACIOJ DUM LA JARO 1966-a:

Dum la lasta jaro 1966-a la I.F.E.A. partoprenis la jenajn manifestaciojn kaj disvolvis la sekvantajn aktivaĵojn:

- Partoprenis multnombre al la 18-a IFEF-Kongreso en Utrecht (Nederlando), dum la monato de majo 1966-a. Ankaŭ la Prezidanto de "Dopolavoro Ferroviario" S-ro Ceci partoprenis kaj salutis esperantlingve la 18-an IFEF-Kongreson, kaj promesis sian helpon por la organizo de 22-a IFEF-Kongreso dum 1970-a en Bologna. En Utrecht li, en la nomo de "Dopolavoro Ferroviario", donacis al la Kongreso bronzan reproduktaĵojn de la "Du Turoj" kiuj estas preskaŭ la insigno de la urbo Bologna.
- Partoprenis la mirindajn Fervojistajn tagojn organizitajn de niaj Hungaraj kolegoj en la kadro de la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto.
- Organizis la Nacian Kongreson de la Fervojistoj-Esperantistoj kiu okazis la 18-an de septembro 1966-a en la kadro de la 37-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto en Carrara ĉe Tirena Marbordo en la zono de la mondfamaj marmorminejoj.

Kiel kutime nia Asocio organizas Esperantajn kursojn (unuagradajn kaj daŭrigajn), ĉe la Profesia Lernejo de la Fervoja Administracio, ĉe la Centra Stacidomo en Bologna, en kunlaboro kun "Dopolavoro Ferroviario".

Ankaŭ en aliaj urboj okazis Esperantaj kursoj, organizitaj de niaj membroj kunlabore kun lokaj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario", por disvastigi la Internacian Lingvon inter la fervojistoj kaj gefamilianoj: ekzemple en Verona, Trieste, Genova Sampierdarena, Albenga kaj Porretta Terme. La Prezidantoj de kelkaj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario" reklamis la Fervojistajn Esperanto-Kursojn per taŭgaj grandformataj koloraj afiŝoj.

Niaj rilatoj kun fervojaj kulturaj organizaĵoj estas tre bonaj kaj aktivaj. Krom kun "Dopolavoro Ferroviario", kiu multe helpas nin ĉiamaniere kaj disponigas ejojn por niaj kursoj, ni havas ankaŭ bonegajn rilatojn kun la "Association Europeénne des Cheminots (A.E.C.)-Itala Sekcio" kiu ofte publikigas niajn artikolojn en sia organo.

La peton al Ĝenerala Direktoro de Ŝtataj Fervojoj kaj al Ministerio pri Transportoj, por ricevi la aldonon de Esperanto al la aliaj kvar lingvoj en la klarigo de la horaro, bedaŭrinde denove ricevis nean respondon.

- Redaktora Raporto pri la JARO 1966-a:

Redaktejo: Bologna - Via Donato Creti, n-ro 61 - Telefonnumero 35.90.71.

La bulteno de I.F.E.A., nomita "ITALA FERVOJISTO-INFORMA BULTENO" aperis la unuan fojon en junio 1951-a; pro tio nun fariĝas 17-jaraĝa; ĝi aperas dumonate kaj estas redaktata plejparte esperantlingve, nur la novaĵoj kiuj interesas ankaŭ la simpatiantoj estas nacilingvaj. Nia organo estas dissendata senpage al ĉiuj membroj de I.F.E.A., al ĉiuj grupoj de Itala Esperanto Federacio, al ĉiuj redaktoroj kaj reprezentantoj de eksterlandaj sekcioj de I.F.E.F., al la redakcioj de la ĉefaj esperantaj gazetoj, al la radio-stacioj kiuj disaŭdigas esperantlingve, al la ĉefestraro kaj redaktoro de I.F.E.F. kaj al personoj kaj organizaĵoj en Italujo kaj eksterlande kiuj interesiĝas pri Esperanto.

La redaktoro klopodis aperigon de artikoloj kaj novaĵoj pri Esperanto en nacilingvaj gazetoj, precipe en fakaj gazetoj, inter kiuj "Voci della Rotaia", gazeto eldonita de la Fervoja Administracio. Ankaŭ "Ferreuropa" gazeto de la Itala Sekcio de A.E.C. (Association Europeénne des Cheminots) publikigis artikolojn pri Esperanto ĝenerale, kaj pri la kursoj de Esperanto por fervojistoj. La nova fervojista gazeto nomita "Notiziario D.L.F." publikigis longajn artikolojn kun fotoj pri nia 18-a IFEF-Kongreso en Utrecht kaj pri la Fervojistaj Tagoj dum la 51-a U.K. en Budapeŝto, kaj pri aliaj Esperantaj manifestacioj organizitaj de Esperantistoj-Fervojistoj en Bologna, Porretta Terme, k.t.p.

Informa bulteno de I.F.E.A. estas multobligita, per tajpita stencilo, en 350 ekzempleroj po numero kaj estas sendata regule al la redaktoroj de la fervojistaj Esperanto-Gazetoj en jenaj landoj: Aŭstrio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Nederlando kaj Svislando. De la suprenotitaj landaj sekcioj ni ricevis interŝanĝe la koncernan organon. Krome, IFEA-Bulteno estas sendata al sekretarioj de IFEF-Sekcioj en jenaj landoj: Aŭstralio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Orienta Germanio, Norvegujo, Pollando kaj Svedio.

Eventualaj abonantoj en,kaj eksterlande estas bonvenaj. La tre modesta abonprezo estas 400 italaj liroj aŭ 5 internaciaj respondkuponoj po jare.

Nia membronombro, kvankam malrapide, ĉiam kreskas; ankaŭ dum la jaro 1966-a novaj membroj plifortigis nian Asocion.

Bologna, la 27-an de januaro 1967-a

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
KAJ REDAKTORO DE "ITALA FERVOJISTO"
(p.i.Germano Gimelli)